BARCELONA ESPERANTO - CENTRO
CARRERAS I CANDI n-ro 34-36
Telefono. 240 25 62
BARCELONO, Katalunio, Hispanujo
JUNULARA SEKCIO DE BEC

# ĜENERALA INFORMILO

N-ro 68 MAJO 1990

## NOVA KONTO DE BARCELONA ESPERANTO-CENTRO

Laŭ la decido de la pasinta ĝenerala kunveno, oni malfermis konton en: CAIXA DE BARCELONA 005-0198-0000104-31, Ag. Sugranyes, strato Sant Frederich 1-3, 08028-Barcelono.

Oni petas al ĉiuj membroj kaj simpatiantoj, kiuj deziras uzi ĝin, ke samtempe oni sendu rekte al la sidejo Carreras Candi 34 36, 08028-Barcelono, leteron informante pri la monsendo.

---

## 50a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La Loka Organiza Komitato, informis nin ke jam aliĝis pli ol 170 samideanoj al la JUBILEA KONGRESO, kaj laŭ pasintaj spertoj, tio signifas ke eble en la kongreso en Sant Cugat del Vallés, oni superos la tradician nombron da kongresanoj. Nia asocio kiel aliaj el Katalunio jam aliĝis, sed ankoraŭ ne faris tion, multaj E-asocioj el la aliaj aŭtonomaj komunumoj.

La venonta monato junio la L.K.K. jam komencos prepari la kongreslibron, kiu enhavos la liston de la kongresanoj kaj subtenantoj; pro tio, se vi deziras ke via asocio aperos en la kongreslibro, ne devas atendi plu. NUN JAM ALIĜU AL LA JUBILEA KONGRESO.

---

## AKTIVECOJ de BEC, en la MONATOJ JUNIO KAJ JULIO

Ĉiumarde, ĉampioneco de tabloteniso, ekde la 7,30 ĝis la 8 h. v.
Ĉiumarde, elementa Esperanto-Kurso, ekde la 8 ĝis la 9 h. vespere
Mardon 26an de junio, MALFERMO DE LA ELEMENTA KURSO. Disdonado de diplomoj, donacoj, paroladoj, festo kaj adiaŭo.

---

Ĉiumerkrede, supera Esperanto-kurso, ekde la 8 ĝis la 9 h. vespere
Merkredon 27an de junio, MALFERMO DE LA SUPERA KURSO. Disdonado de diplomoj, donacoj, paroladoj, festo kaj adiaŭo.

---

Tagojn 9an kaj 10an de julio, kunlaborado en la preparlaboroj de la 50a Hispana Kongreso de Esperanto; 11an ĝis 16an de julio, partopreno en la JUBILEA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO en Sant Cugat del Vallés.

---

Ĉiuj lernantoj kaj membroj kiuj deziras, povas partopreni, en la festoj de la malfermo de la E-kursoj kaj kunlabori en la 50a kongreso.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

ATENTON. Kiel ĉiujare Barcelona Esperanto-Centro, restos fermita dum la monato aŭgusto. Tio signifas ke la novaj kunvenoj komenciĝos la tagon 4an de septembro. FELIĈAN FERIADON.

---